
# La Krokodil'



Informbulteno de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo
1 rue Jean Aillet, 31000 Toulouse
tel/fax 05 61 25 55 77 courriel : esperanto.toulouse@free.fr
http://esperanto.toulouse.free.fr/

**N° 24 februaro 2004**

## Sommaire

| Sommaire | p |
|---|---|
| Conférence Flavio REBELO**:** **Internacia Televido** | **1** |
| Le Projet ITV | **2** |
| Prelegoj pri ITV tra Eŭropo | **3** |
| Eblecoj kontribui mone... ......... | **4** |
| **Junuloj** : Luda semajnfino en Donneville | **5** |
| Un week-end de **pédagogie** à Paris 21-22 feb. | **6** |
| :Ni debatis pri **: Esperanto kaj Politiko** | **6** |
| Venonta **debato** : 26an de feb. temo : internacia televido | **7** |
| Dans notre région **(calendrier)** | **7** |
| **UNE LANGUE POUR L'EUROPE ?** nouveau livre d'André CHERPILLOD | **7** |
| **Raporto :Monda Socia Forumo en Mumbajo** (15-22 jan.) | **8** |

Conférence-débat

par

Flavio REBELO

Projekto

# Internacia Televido en esperanto

## lundi 16 février à 20h.45

Centre de loisirs SNCF 2 Ave. de l'Hers
31500 Toulouse

## Projet ITV (en la franca)



Voici une nouvelle étape dans l'histoire de notre langue. Le temps est venu d'avoir une télévision en espéranto: voici ITV - Internacia Televido. Avec l'aide financière des espérantophones du monde entier, l'équipe professionnelle du portail Ĝangalo lancera bientôt la première chaîne de télévision sur Internet entièrement en espéranto. Ses programmes seront nécessairement professionnels, bien réalisés et filmés, d'une telle manière que ce sera un plaisir de suivre les séries ou les films en espéranto diffusés par ITV. Tous les jours, les informations du monde entier vous parviendront par le journal télévisé de ITV qui, avec le portail d'informations Ĝangalo, vous montreront le monde selon un point de vue espérantiste. L'administration de ITV a prévu que dès le lancement de la chaîne, une partie du programme sera destinée aux débutants dans la langue. Un programme spécial sur les clubs et les associations d'espéranto à travers le monde, ainsi que des interviews télévisées avec nos chanteurs, hommes politiques et écrivains feront aussi partie des programmes quotidiens de la chaîne.

Pour la réalisation de cette admirable chaîne de télévision en ligne, l'administration du Projet ITV a besoin du soutien de tous les espérantophones. A la suite de calculs exhaustifs, l'équipe des professionnels de Ĝangalo est arrivée à la conclusion qu'il est en effet possible de lancer sa propre chaîne de télévision sur Internet, avec des programmes variés, une diffusion 24 heures sur 24 et 7 jours sur 7, pour seulement 35.000 euros. Cela semble beaucoup, mais il faut se rappeler que rien que l'association UEA (Universala Esperanto-Asocio) compte déjà plus de 5.000 membres, sans compter SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto), ESK (Esperanto-Societo Kebekia), SES (Svisa Esperanto-Societo), etc. ; on peux sans nul doute affirmer que le capital nécessaire pour ITV est (et sera) possible à atteindre. Pour cela, il suffirait que :

- 1 400 personnes donnent 25 euros, ou
- 700 personnes donnent 50 euros, ou
- 350 personnes donnent 100 euros, ou
- 140 personnes donnent 250 euros.


On peut voir facilement que la somme, même si elle est un peu élevée, n'est pas impossible à atteindre. La route est longue, mais nous, les espérantistes, en gravissons déjà les premières marches. L'administration du Projet ITV est certaine qu'il ne s'agit que d'une affaire de temps... et le temps peut en grande partie devenir moins long si vous aussi, vous contribuez à ce projet! Faites un virement d'une somme égale ou supérieure à la contribution minimale (25 euros) sur le compte UEA de Ĝangalo (GXAN-V), ou contactez l'administration du Projet ITV pour être informé au sujet des autres moyens de contribuer financièrement.

Aidez nous à révolutionner l'espéranto par la mise en place de la première chaîne télévisée en ligne, entièrement dans la langue internationale. Tout dépend de la participation des espérantophones de France, de Belgique, de Suisse, du Québec et du monde entier.

Pour plus d'informations sur le Projet ITV, envoyez un message avec vos doutes, suggestions, idées et contributions à televido@gxangalo.com.

# Prelegoj pri ITV tra Eŭropo

Flavio Rebelo, ĉefredaktisto de Ĝangalo kaj la ĉefa administranto de la Projekto ITV, vojaĝos al 22 urboj, tra 15 eŭropaj landoj, de la 11a de februaro ĝis la 25a de marto, prelegante pri la establo de ITV (Internacia Televido), la unua interreta televidkanalo tute en Esperanto.




**Blua linio reprezentas veturon per trajno, kaj verda veturon per aviadilo. La itinero de Flavio Rebelo estas:**

**1. Barcelono (Hispanio) - 11a/12a/13a/14a de februaro**
**2. Montpeliero (Francio) - 15a/16a**
**3. Tuluzo (Francio) - 16a/17a**
**4. Parizo (Francio) - 18a/19a**
**5. Bruselo (Belgio) - 20a/21a**
**6. Roterdamo (Nederlando) - 22a/23a**
**7. Hamburgo (Germanio) - 24a**
**8. Kopenhago (Danio) - 25a**
**9. Berlino (Germanio) - 26a**
**10. Varsovio (Pollando) - 27a/28a**
**11. Munkeno (Germanio) - 29a/1a de marto**
**12. Vieno (Aŭstrio) - 2a**
**13. Budapeŝto (Hungario) - 3a/4a/5a**
**14. Zagrebo (Kroatio) - 6a/7a**
**15. Ĉaŭdefono (Svisio) - 8a**
**16. Liono (Francio) - 9a**
**17. Torino (Italio) - 10a**
**18. Milano (Italio) - 11a/12a**
**19. Bolonjo (Italio) - 13a**
**20. Romo (Italio) - 14a/15a/16a/17a**
**21. Londono (Britio) - 18a/19a/20a**
**22. Dublino (Irlando) - 21a/22a/23a**
**23. Lisbono (Portugalio) - 24a/25a**

## Eblecoj kontribui mone por ITV

Kiam vi kontribuas mone al la projekto ITV, vi aŭtomate fariĝas membro de la subportalo de la kampanjo (http://gxangalo.com/televido). Per ĉi tiu portalo, vi povas scii detalece kiel marŝas la projekto. Per la kalendaro, vi scios pri ĉiuj rendevuoj, kunsidoj kaj kunvenojn faritaj de la projekta teamo kun fakuloj pri interreta televizio, informadiko kaj televida medio. Ĉe la dekstra flanko de la portalo, oni trovas la nomojn de la plej lastaj mondonacintoj (krom se tiuj volas resti anonimaj). La maniero, per kiu la administrantoj de la projekto elspezas la donacitan kapitalon povas esti ĉiumomente kontrolita de la membroj de la subportalo, per speciala modulo. Oni ankaŭ povas rekte pridemandi la administrantojn de la projekto ITV pri detaloj de la venonta televidkanalo, ties futuraj programeroj ktp. La celo estas fari la administradon de la kapitalo kolektita ĉe la esperantistaro kiel eble plej diafana kaj kontrolebla de ĉiuj.

Oni povas kontribui mone al la kampanjo por financado de la unua tute en Esperanto interreta televidkanalo per ĝiro en la UEA-konton de Ĝangalo (GXAN-V), laŭ unu el la subaj kategorioj:

- 25 eŭroj - Kontribuinto
- 50 eŭroj - Subtenanto
- 100 eŭroj - Speciala Subtenanto
- 150 eŭroj - Ora Subtenanto
- 200 eŭroj - Apoganto
- 250 eŭroj - Speciala Apoganto
- 300 eŭroj - Ora Apoganto
- 500 eŭroj - Partnero
- 1.000 eŭroj - Speciala Partnero
- Pli ol 1.000 eŭroj - Ora Partnero

De Apogantoj al la superaj kategorioj, la kontribuinto ricevas diplomon, atestantan lian partprenon en la financado de la projekto ITV. Kluboj, asocioj kaj ligoj ankaŭ povas esti enmetitaj en la supraj kategorioj, tiel ke ankaŭ E-organizaĵoj ricevos diplomon, okaze de kontribuoj superantaj 150 eŭrojn.

Post kiam vi faris vian mondonacon, la administrantoj de la Projekto ITV petas vin bonvole informi nin, per la retadreso televido@gxangalo.com. Kontribuu, partoprenu en la plej granda aventuro de Esperanto ekde ties lanĉo en 1887 - la establo de la unua tute en Esperanto interreta televidkanalo.

## Ekzemploj de interreta televizio

Multaj personoj ankoraŭ ne bone komprenis kiel funkcios la unua televidkanalo tute en Esperanto, ITV (Internacia Televido). Pro tio, la administracio de la Projekto ITV disponigas kelkajn ekzemplojn de jam funkciantaj televidkanaloj, kiuj elsendas laŭ la sistemo de interreta televizio. Vizitu ilin, eventuale instalante la programojn mankantajn por ilin spekti (estas senpage, kaj preskaŭ ĉiu retejo ofertas la ĝustajn programojn por elŝutado), komprenante tiel, kia estos ITV:

- AllTV (en la portugala)
- webTV (en la germana)
- AdventureTV (en la angla)
- Doordarshan (en la angla kaj hindia)
- FunTV (en la franca)
- HRTweb (en la kroata)
- Terra (en la portugala)

La teknologio malantaŭ interreta televizio nomiĝas elsendfluo (angle 'streaming'), kaj estas relative nova maniero elsendi bildojn kaj sonojn tra la reto. Oni ne bezonas nepre elŝuti la enhavon spektotan, ĉar ekzistas du manieroj elsendi: laŭ peto aŭ vive. La elsendfluo laŭpeta funkcias tiel, ke oni devas musklaki sur butono en la retejo por elŝuti la spektotan programeron,

**dum per viva elsendfluo, oni simple alvenas al la retejo kaj spektas tion, kio estas montrata sur la ekraneto. ĉi tiu lasta sistemo (viva elsendfluo), novaĵo inter interretaj kanaloj, estas uzata nuntempe 24-horojn tage kaj 7-tagojn semajne nur de unu televidkanalo - la brazila 'AllTV'. Estas intenco de la administracio de la Projekto, ke ITV estu la dua televidkanalo sur la mondo, kiu elsendos vive 24 horojn tage, 7 tagojn semajne. Ĉar nia spektantaro estos tiel disa, kia estas la E-komunumo, dekomence estos nur 4 horoj da originanalaj programoj por tago, kiu ripetiĝos ses fojojn dum la tago, atingante tiel 24-hora elsendado, kaj tiel ebligante al ĉiu esperantisto, ne gravas de kie kaj je kiu horo, spekti la programojn.**

**Atentu ankaŭ al la fakto, ke interreta televizio postulas aliajn aparatojn, multe pli similajn al tiuj, kiuj ni jam havas en niaj hejmoj (la kameraoj, ekzemple, povas esti tiuj modeloj pli popularaj de 'Sony', 'JVC' ktp). La studio ne bezonas kameraistojn, ĉar la teknologio de elsendfluo ne akceptas rapidegajn movojn nek de la filmanto, nek de la filmato. Ĉio ĉi draste minimumigas la kostojn, ebligante al nia teamo proponi la establon de televidkanalo propra al la esperantistaro kontraŭ nuraj 35.000 eŭroj.**

**Por pliaj demandoj pri la maniero funkciigi interretan televizion, kaj specife pri la laboro ĉe Projekto ITV, bv. kontakti nin per la retadreso televido@gxangalo.com.**

## Modelo de studio por ITV

**Jen ekzemplo de profesia studio por registro, muntado kaj reĝisorado de filmoj kaj programoj por interreta televidkanalo. Plej eble la studio de ITV tre multe similos al ĉi tio.**

**Studio, kun du kameraoj, lumstativoj kaj tabloj moveblaj**

**Aparataro por filma muntado, registrokontrolo kaj reĝisorado (lumoj, mikrofonoj, kameraoj ktp)**

**Sonaparatoj por dubli, filtri kaj reliefigi sonojn dum la filmado**



## week-end de jeunes a donneville (15 km de Toulouse) Luda semajnfino

Du 16 au 18 avril 2004, Espéranto-Jeunes vous invite à participer à un nouveau week-end à 10 km de Toulouse. Cette fin de semaine vous permettra de découvrir de nouveaux jeux venus de différents horizons... et aussi de faire découvrir votre jeu préféré.

Coopérer, jouer seul ou en équipe, deviner des énigmes, vous courir l'un après l'autre ... vous pourrez faire tout cela pendant le week-end.

Chercher détails et bulletins d'inscription sur :**http://esperanto-jeunes.org/eventoj/aligxilo_luda.html**

Espéranto-France organise les 21 et 22 février 2004 un week-end inter-associatif de

# Formation à l'enseignement des langues étrangères.

*Vous animez déjà un cours dans votre région et vous souhaiteriez améliorer vos méthodes ?*
*Vous envisagez de proposer un nouveau cours dans votre ville et vous hésitez sur la façon de vous y prendre ? Ce stage est fait pour vous.*

Por helpi la instruantojn de esperanto, plej ofte ne profesiajn instruistojn aŭ instruistojn de lingvoj, Espéranto-France kaj Groupe des Enseignants Espérantophones organizas la 21an kaj 22an de februaro 2004 praktikan staĝon en la sidejo, 4 bis rue de la Cerisaie, Paris (4ème) metroo Bastille . Espéranto-France repagos viajn vojaĝkostojn surbaze de duaklasa trajno.

Petu de Esperanto-France la PROGRAMOn info@esperanto-france.org), pertelefone (01 42 786 886), aù perfakse (01 42 780 847).

# Esperanto kaj politiko ĉe *Le Bâton à Palabre*

Raportas : Jacques CAUBEL

Ĉiumonate okazas debato en esperanto en la filozofio-trinkejo *Bâton à Palabre*. La unua kunveno havis ĉi temon : ĉu enkonduki esperanton en la politikon, ekz. ĉu prezenti liston por la eŭropa baloto de junio 2004 ?

La 19an de januaro partoprenis dek tri esperantistoj la vesperan diskuton pri eniro de esperanto en politikon, plus la paro Jean-René kaj Hélène Funel, kiuj akceptis nun en sia kafejo « Babiliga bastono ».

André Mirc estas sur la kandidatlisto de Thierry Saladin por la suda distrikto, kiu entenas tri regionojn : Akvitanio, Midi-Pireneoj kaj Langvedoko. Jam 16 kandidatoj ekzistas ; mankas ankoraŭ kvar pliaj.

Unue, kio signifas politiko ? Ilo por trompi la civitanojn ? Rimedo por ke la homoj sin sentu bone ? André klarigas, ke la nura celo de tiu kandidatlisto estas aŭdigi pri esperanto. Eĉ se ni iĝos ridindaj antaŭ la ĵurnalistoj, almenaŭ la publiko scios, ke esperanto ne mortis ! Kelkaj ĉeestantoj preferus tutan politikan programon. Ĉu tio necesas ? (Coluche, les Motivé-e-s nenion proponis). Jeannette sciigas, ke la programo de la esperantaj kandidatoj entenas demokration, kiu ne ekzistas en la nuna Eŭropo (« demokratio-deficito ») ; la unua paŝo por solvi la problemon estus neŭtrala lingvo. Du ĉeestantoj elektus la anglan, jam lernatan en bazaj lernejoj.

Bedaŭrinde ŝajnas, ke nur Francio prezentos esperantajn kandidatojn (*).

En nia regno kelkaj partioj jam favoras al esperanto : ekz. la socialistoj. UFE, la neŭtrala franca asocio pri esperanto, opinias, ke ni ĝenos ilin, se aperus aparta esperanto-partio ; sed kiom da procento de voĉoj ili perdus ? Gustave aldonas, ke multaj havas pli gravajn problemojn ĉiutagajn ol lingvajn. Sed nur duono de la civitanoj voĉdonas ; Floreal neniam ; li trovas danĝera eniron en televidon.

Ekde la 22a horo kaj duono, la diskuto iom disiras, kiam Bernard agnoskas : mi subtenas la ideon esperanto, ne la lingvon mem ; li asertas, ke esperanto estas nur eŭropa lingvo ; tio veras rilate al la radikoj, sed – laŭ Christian – ne rilate al la strukturo.

Preskaŭ ĉiuj parolis dum tiu vespero, ne timante multajn lingvajn eraregojn.

Kial ne havi parol-bastonon por pli bone parolajn daŭrojn disdoni, kaj ... parolajn fuŝaĵojn batpuni !

(*) laŭ lastaj informoj, ankau en Germanio ekzistas esperanto-listo de kandidatoj por la baloto de junio, kaj ties ĉefulo estas Reinhard SELTEN , Nobel-premiito por ekonomiko en 1994.

## La venonta debato : ĉe *Le Bâton à palabres,* *15 rue de Thionville*

Dato :**la 26an de februaro** je la 20a h. (5 € por vinglaso k manĝeto)

Temo : **internacia televido,**

## Dans notre région...

**Korusa semajno 29 feb-6 marto**, en 09300 Montferrier (claude.fressonnet@wanadoo.fr)

**Stage d'espéranto débutant** : mêmes dates et lieu (claude.fressonnet@wanadoo.fr)

**Semajnfino Kataluna** : **1-2 majo** 66760 Porta (apud Puigcerda) por komencintoj kaj progresantoj,

Vidu klarigojn : **http://www.esperanto-ct.org/c/novetats/porta.pdf**

Vidu la gastejon : **http://www.equi-libre.fr/gite.htm**

Aliĝilo : **http://www.esperanto-ct.org/c/portaalighilo.html**

**Stage d'espéranto** (tous niveaux) **19-26 majo** 34500 VIAS (chrizo@worldonline.fr)

*Un nouveau livre de André CHERPILLOD, en prise avec l'actualité*

# Une langue pour l'europe ? **mais oui !**

**pour sauver les langues de l'Europe**

Le problème de l'Europe ne date pas d'hier.

*« Il nous faut un code européen, une cour de cassation européenne, une même monnaie, les mêmes poids et mesures, les mêmes lois ; il faut que je fasse de tous les peuples de l'Europe le même peuple.* » (Mémoires de Fouché, deuxième partie, ch. IV). C'est ainsi que Napoléon s'exprimait devait son ministre Fouché en janvier 1812.

En 2003, toutes ces conditions sont réalisées ou sont en passe de l'être. Mais un élément, pourtant fondamental, est absent de ce programme napoléonien : UNE LANGUE EUROPEENNE COMMUNE. A quoi sert-il d'avoir les mêmes lois et la même monnaie si chaque Européen est métamorphosé en sourd-muet dès qu'il franchit les frontières de son pays ?

A ce sujet, l'écrivain italien ***Umberto Eco***, le célèbre auteur du *Nom de la rose*, déclare au *Figaro* : *« On ne fera jamais l'Europe si on ne tient pas compte du problème de la* ***compréhension mutuelle****. Quant des gens de trois ou quatre pays du Continent se rencontrent, il faut qu'ils puissent communiquer entre eux. Là-dessus on est tous très en retard. On enseigne les langues sans se soucier de leur importance dans le monde d'aujourd'hui.* » (19 août 1993) ?

Or cette condition, une langue *commune* (évidemment, commune ne signifie pas *« unique »),* pourtant essentielle à la communication humaine, n'est pas réalisée, et il ne semble pas qu'elle le devienne dans un avenir proche. En tout cas, nos tireurs de ficelles font tout pour empêcher sa réalisation. Pourtant, la possibilité de communiquer est un aspect essentiel de toute vie collective ; sans un moyen direct d'échanger des idées, il ne peut y avoir de cohésion entre les hommes.

Comme touts les livres d'André Cherpillod, *Une langue pour l'Europe ?* est vendu à un prix très modique – 4,50 €, **et vous pouvez l'acquérir à E.K.C**., pour votre curiosité, pour vos amis, pour réviser vos notions sur la pertinence de l'espéranto en 2004.




# Raporto pri Esperanto-Agado dum la Monda Socio Forumo, Mumbajo, Barato, la 15a-22a de Januaro 2004

D-ro A Giridhar RAO, Ĝenerala Sekretario de Federacio Esperanto de Barato

Tuta raporto legablas ĉe : http://www.geocities.com/bharato

**"Inter tiom da interesaĵoj, jen la plej interesa," deklaris Ŝjam MOHITE, advokato, vizitante la budon de la Universala Esperanto-Asocio dum la Monda Socia Forumo (MSF) en Mumbajo, Barato.**

**S-ro Mohite estis inter la pli ol mil homoj kiuj scivolemis pri 'nia afero'. Ja imponis la gamo de homoj kiuj volis scii pri Esperanto -- agrikulturistoj, advokatoj, dommastrinoj, emerituloj, instruistinoj, ĵurnalistoj, monaĥinoj, pastroj, profesoroj, studentoj, tradukistoj, kaj plej videble, ĉiuspecaj aktivuloj kontraŭ iu aŭ alia nejusteco en la mondo.**

**Agnoskante la gravajn lingvajn barilojn, tiu ĉi MSF havis ne malpli ol 13 'oficialajn lingvojn'! Tamen, ni ĉe la UEA budo, sufiĉe ofte aŭdis la malkontenton de la partoprenantoj pri lingva ekskludo. (Efektive, eĉ unu el la voluntulinoj en la senpaga tradukistara reto, Babels, kiu ja laboregis dum la MSF, plendis al mi pri la malfacilecoj kaj breĉoj de tiu ĉi interpretistara servo.)**

**Nesurprize do, ke la vizitantoj al nia budo interesegis pri lingva demokratio kaj tuj konsentis pri la bezono de facila kaj neŭtrala lingvo. "Jen Esperanto!" ni diris -- *Alia Lingvo Eblas* ni sloganis, eĥante la sloganon de la MSF -- *Alia Mondo Eblas*.**

**La kaŭzo, parte, estas ke ni -- d-ro P V RANGANAYAKULU de Tirupatio, s-ro Nischad SALAM de Puneo, kaj mi de Hajderabado -- parolis kun la vizitintoj ne nur en la 'ĉiopova' angla, sed ankaŭ en la hindia, kanara, malajalama, maratha, telugua, kaj la urdua.**